

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Aŭgusto 2018

(50a jaro)

N-ro 178

Esperanto Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str.86 DE 09123 CHEMNITZ



Poŝtkarto kaj poŝtstampo memore al Töke István
okaze de la 28. VERDAJ AMIKAJ TAGOJ,
en Senta, Serbio, 29.6.2018

Hans Jankowski forpasis



25. 4. 1929 – 10. 5. 2018

Nia kara amiko Hans Jankowski forpasis 89-jara la 10an de Majo 2018 en flegohejmo en Dortmund. Tie li vivis en siaj lastaj tri jaroj.

Antaŭ 70 jaroj (1948) li venis al nia Esperanto-movado.

Li ŝatis vojaĝi kaj viziti E-kongresojn.

Ofte li partoprenis kunvenojn en Nepalo kaj grave subtenis la tiean E-naskiĝon. Li ankaŭ ebligis al nepalaj E-istoj vizitojn en eŭropaj E-kunvenoj.

Antaŭ 40 jaroj li venis al ELF/AREK kaj estis aktiva en numismatiko, E-filatelo kaj erinofilio.

Li eldonis i.a. jenajn katalogetojn:

1989 Esperantomono (16 paĝoj))

1989 Morigaj Esperantomedaloj kaj -moneroj (18 paĝoj)

1993 Glumarkoj de SAT-AMIKARO (6 paĝoj)

1995 Esperanto medaloj (32 paĝoj)

2003 Esperanto-poŝtmarkoj (18 paĝoj)

Li ripozu en paco.





La poŝta stampo



Kongresanoj
kun nia Haruja Maekaŭa




Por la kongreso nia kolego Haruja Maekaŭa iniciatis aperon de pm-serio kun 4 pecoj, kongresan koverton, poŝtkarton kaj kongresan poŝtan stampon.

La 4 poŝtmarkoj montras nominalojn de 1x62 kaj 3x82 e.

La ruĝa stampo havas diametron de 32 mm

Uzita: 26a kaj 27a de Majo 2018 en poŝtejo Suita

Aerpoŝte sendita kongresa koverto kun kongresa stampo
Ni dankas pro senditaj materialoj al Haruja Maekaŭa kaj Ziro Suzuki



KANSAJA LIGO DE ESPERANTO-GRUPOJ (KLEG) estis fondita en Osaka 1951. La ligan iniciatis Miyamoto Masao kaj aliaj, kaj partoprenis dek kvin grupoj el la gubernioj Osaka, Kyoto, Hyogo, Nara, Wakayama. Ili celis reformi la movadon en la tuta lando surbaze de demokratia organizo, kaj por tio unue sin organizis kaj alvokis aliajn same fondi ligojn de grupoj, kaj tiel havi la tutlandan ligan aŭ federacion de la japana Esperanto-movado. Tamen tiu plano ankoraŭ ne realiĝis tutlande, sed nur parte en la nuna demokratigita reorganizo de JEI. La kerno de ĝia aktivado konsistas el tri kolonoj. La unua estis la monata gazeto "La Movado", kiu iom poste fariĝis la komuna kun tri aliaj ligoj en la okcidenta Japanio. La dua estas la komitato, kiu estas la decid-organo de la ligo. La komitatanoj estas elektitaj de la aliĝintaj grupoj laŭ la nombro de la membroj.

Por plenumi la decidojn laboras la plenumkomitato. La tria estas la oficejo. La ligo posedas sian propran sidejon en urbeto Toyonaka apud urbo Osaka. En la oficejo ĉiutage deĵoras unu el kelkaj volontuloj kaj faras servojn al la membroj. La oficejo funkcias ankaŭ kiel kunvenejo kaj stokejo de la eldonaĵoj.

Ankaŭ menciindaj estas ĝiaj aktivadoj: kongresoj, kursaroj, eldonado kaj koresponda servo. Ĝi ĉiujare organizas kaj kongreson de esperantistoj en la regiono Kansajo kaj intensivan kursaron, nomatan Friska Lernejo, en somero, kaj havas la eldonan fakon je la nomo de Japana Esperanta Librokooperativo, kiu konstante eldonas librojn, de lerniloj ĝis literaturaĵoj.





La kongresa poŝtstampo



La kongresa koverto kun stampo kaj individuaj pm



La 104-a Japana Esperanto-Kongreso okazis je la 3a-5a Novembro 2017 en Jokohamo.

Nia amiko Haruja Maekaŭa iniciatis eldonon de kvar ipm:

-kadro 3,3x4,0	(supre maldekstre)	Nominalo 82 enoj
-kadro 3,9x3,9	(supre dekstre)	Nominalo 82 enoj
-kadro 3,0x3,0	(sube maldekstre)	Nominalo 62 enoj
-sen kadro	(sube dekstre)	Nominalo 82 enoj

Poŝta memorstampo kun diametro de 31 mm en ruĝa.

(3-5 11 2017 en poŝtejo Yokohama Port)

Aperis memorkoverto kaj poŝtkarto kun la kongresa emblemo.

*Koran dankon al Haruja Maekaŭa kaj Suzuoki Ziro
pro senditaj materialoj!*

2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio



**La 105-a Japania Esperanto-Kongreso
La 50-a Korea Kongreso de Esperanto**

12-14 de oktobro 2018 en Nara, Japanio

Kongresa temo:

Diverseco kaj komuneco de kulturoj

Organizantoj:

Japania Esperanto-Instituto

Korea Esperanto-Asocio

Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj

La 1-a Komuna Kongreso okazis 2011 en Seongnam, Koreio.

La kongresa simbolo konsistas el la naciaj floroj de Koreio (hibisko; dekstre) kaj Japanio (ĉerizfloro; maldekstre). Videblas ankaŭ Zika-cervo. Pli ol mil cervoj vivas en la Nara-parko.

**La kongresa programo i. a. antaŭvidas viziton al la Nara-Universitato.
Tie studis VERDA MAJO.**



**Por la 1-a Komuna Kongreso en 2011 aperis tiu ĉi ipm, valoro 250 uonoj.
Bedaŭrinde ĝi mankas al mi... Same la memora pk-tutaĵo.**

Japanio 47-57

日本で使用されたエスペラント大会記念スタンプ印影集



Haruja Maekaŭa sendis suplementon por la japanaj E-stampoj 47-57.
 Eĉ videblas la stampo por la komuna japana-korea kongreso 2018 en Nara.
 Esperantlingvaj klarigojn vi trovas en niaj antaŭaj LVL-oj.
 Mi aldonas la originalan japanlingvan tekston.

	大会名	開催地	使用局	使用期間
47	第100回日本エスペラント大会	東京	葛西	2013. 10. 12~15
48	第62回関西エスペラント大会	姫路	姫路	2014. 05. 31~06. 01
49	第101回日本エスペラント大会	小浜	小浜	2014. 10. 11~13
50	第63回関西エスペラント大会	京都	左京	2015. 06. 20~21
51	第102回日本エスペラント大会	仙台	仙台中央	2015. 10. 10~12
52	第64回関西エスペラント大会	堺	泉北	2016. 06. 18~19
53	第103回日本エスペラント大会	近江八幡	近江八幡	2016. 10. 08~10
54	第65回関西エスペラント大会	豊中	豊中阪大内	2017. 06. 03~04
55	第104回日本エスペラント大会	横浜	横浜港	2017. 11. 03~05
56	第66回関西エスペラント大会	吹田	吹田千里	2018. 05. 26~27
57	第2回日韓共同開催エスペラント大会 第105回日本エスペラント大会	奈良	奈良中央	2018. 10. 12~14

Montrita ankaŭ poemo dediĉe al la 4a UK en Saks-germana dialekto kaj kopio de teatro-afiŝo por la opero IFIGENIO EN TAŬRIDO, prezentita en E dum la Kongreso.



Li serĉas korespondaĵon de Marie Hankel, Dresden, por la Saksa E-Arkivo.




La glumarko



La stampo

Ĉi-jare denove la Esperanto-societo de Senta okazigis "Verdaj Amikaj Tagoj". Oni honorigis la hungarlingvan kolektanton de anekdotoj Istvan Töke. En la solenaĵo partoprenis i. a. la Hungara Balatona Kultur-societo, kaj Laszlo Aranka, prezidanto de la najbara E-klubo Szabadka, kiu tradukis en Esperanton pluraj el la anekdotoj de Istvan Töke. La klubo eldonis poŝtkarton kun la Töke-portreto kaj iniciatis poŝtan memor-stampon, uzitan 29. 06. 2018 en Senta.



La poŝtkarto sendita de Imre Belec - Dankon al vi!



**Medalo Granda Arĝento
en itala filatela ekspozicio
APPIIPHIL 2018
por nia amiko
Alessandro Bellucci**

La

diplomo



Poŝta stampo de la ekspozicio

CONOSCERE L'ESPERANTO

Nel mondo sono presenti migliaia di dialetti e lingue. Questa situazione trova una giustificazione nella religione cristiana nella Bibbia.
"Il Signore disse: -Ecco! Sono un solo popolo ed una sola lingua... Scendiamo e confondiamo la loro lingua, SICCHE' NON SI INTENDANO L'UN L'ALTRO".

BELGIO Torre di Babele

EIRE Commissione Europea, le 6 lingue della Comunità Europea

L'ESPERANTO è una proposta di una lingua comune facile ed accessibile a tutti.

CROAZIA Lingue

Piano:

1. Presentazione	1 foglio
2. Storia	3 fogli
3. Grammatica	4 fogli
4. Letteratura	2 fogli
5. Il movimento	1 foglio
6. I congressi	3 fogli
7. La lingua pericolosa	1 foglio
8. Riflessioni finali	1 foglio
	16 fogli

La titola folio kun la enkonduko

Li partoprenis en speciala sekcio de 1-panelaj ekspozitaĵoj.

La 16 folioj videblas en la reto sub la ligo

<http://expo.fsfi.it/latina2018appiiphil/exhibits/32BelluccibzhiM0lr>.

Antaŭ du jardekoj ankoraŭ floris la E-filatelito en la P. R. Ĉinio, ne nur en Pekino, sed ankaŭ en aliaj ĉinaj urboj. Konatiĝis al ni Song Shengtan, Zhang Linrui, Zhou Ziqui, Sheng Suchu, Zhu Baogang, Qin Kaighi, Ding Shihui, Shen Minglun, Gao Zhenxing, Laŭlum kaj aliaj. Ili estis tre aktivaj kaj dank' al ili ni hodiaŭ fieras pro posedo de dikaj albumoj je ĉinaj E-filatelaĵoj kun E-poŝtmarkoj, memorstampoj, poŝtkartoj kaj UTK-oj.

Tiu ĉi materialo ebligas fari imponajn kaj instruivajn ekspozitaĵojn.

Ekzemple pri la ĉina lunkalendaro:

La 12-jaran ciklon simbolas 12 bestoj. La ĉinoj nomas la 12 simbolojn Shēngxiāo. Kvin 12-jaraj cikloj formas Grandan ciklon kun 60 jaroj. Lunojaro havas nur 354 tagojn, sunojaro 365. Tial la ĉino egaligas la diferencon per 7 „super-monatoj“ en 19-jara ritmo.

En la Novjara Tago de la lunkalendaro komenciĝas la Printempa Festo.

S-ro Zhu Baogang en Xian skribis pri ĝi: „Por ni ĉinoj la Printempa Festo estas la plej granda tradicia festo. Miaj familianoj kunvenas en mia hejmo por celebri la feston, ankaŭ kun la najbaroj. Sur la tablo estas fiŝoj, garantio por tio, ke tra la tuta jaro estos sufiĉe da manĝaĵo sur la tablo.“

Al la Printempa Festo venas ankaŭ la animoj de mortintoj kaj restas ĝis la tago de la Lanterna Festo (15-a tago).

La 60-jara granda ciklo havas por ĉiu jaro propran nomon, kiu fontas el kombino de bestonomoj de la „12 terobranĉoj“ (Dì zhi) kun la nomoj de la „10 ĉielotrunkoj“ (Tiān gān). La nuna 60-jara ciklo komenciĝis en la jaro 1984. Jen tabelo de la unua 12-jara ciklo:

1984 Jia Zi	Rato (muso)	1985 Yi Chou	Bubalo (bovo)
1986 Bing Yin	Tigro	1987 Ding Mao	Leporo
1988 Wu Chen	Drako	1989 Ji Si	Serpento
1990 Geng Wu	Ĉevalo	1991 Xin Wei	Ŝafo (kapro)
1992 Ren Chen	Simio	1993 Gui You	Koko
1994 Jia Xou	Hundo	1995 Yi Hai	Porko



Jen 4-fena pm sur novjara salutkarto por la „Jaro de la Rato“ (1984)
La raton oni vidas en Ĉinio lige kun mono. Oni ankaŭ parolas pri „monorato“
kaj signifo de avarulo ne estas malproksima.
Naskitoj sub la rato-simbolo laŭdire estas sentemaj kaj ĉarmaj.



1984: La Bovojaro. Aperis bovo-poŝtmarko en nominalo de 8 fenoj. Ofte ni renkontas ĝin sur la dekoraj kovertoj por la 1-a Ĉina Esperanto-kongreso en Kunming.




Weihui



Hangshu



Maanshan



La unuataga koverta kun E-stampo de Changshu (1989)

Lige kun la pm Serpentojaro 1989 aperis en Changshu E-lingva UTK. E-stampoj aperis en Maanshan, Hangshu kaj Weihui.



Muziki per amikeco

Ŝakflutista taĉmento
„The Artur Troops
Pipes and Drums“
en Alkmaar, Nederlando,
elektis por sia taĉmenta
emblemo sloganon en Esp.
La grupo konsistas el 24
membroj.
Ĝi fondiĝis en 2008.

Trovis tion J. R. Piton




Tamburo kun slogano MUZIKI PER AMIKECO




Pošta karto kun afrankita respondo



Pošta karto kun afrankita respondo



FERMITA LETERO (KUN: Adreso de la Sendinto)



**2018 Senta Serbio****35-a datreveno de la morto de Istvan Töke****Konata kolektanto de anekdotoj****Verdaj Amikaj Tagoj - Senta 2018****Bildo: Zamenhofa glumarko de 1959****2 verdaj steloj kun *Esperanto Senta*****Koloroj: nigra teksto sur blanka****Bildo: blua sur flava kaj verda****Mezuro: 70x38, memglua, nedentumita****Sendis: Imre Belec, Senta****Dankon!****2018 Suita Japanio****La 66a kongreso de Esperantistoj en Kansajo****Bildo: Sunoturo en la Suita-parko de Osaka****Koloroj: blua, verda, ruĝa, blanka****Mezuro: 33x33, nedentumita, memglua****2018 Nara Japanio****La 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio,****Bildo: Floroj kaj cervokapo****Multkolora****Mezuro: 33x33, nedentumita, memglua**

Karaj geamikoj, bonvolu: se vi renkontas nekonatan glumarkon, sendu al ni kopion aŭ originalon.

En preparo estas nova glumarko-katalogo. Niaj du malnovaj katalogoj el plumo de Reinhold Jensen / Anna-Strönne kaj Richard Hirsch / R. Burmeister urĝe bezonas aktualigon.

ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO
 havas la honoron inviti vin al la
LANDA KONFERENCO
 kiu okazos dimanche, la 6.4.1969 je horo 16.00
 en la domo de Histadrut, str. Arlozorov 93, T.A.

TAGORDO:

- * Inauguro kaj salutoj
- * Raportoj
- * Prelego: Skizo pri la vivo kaj morto de d-ro L.L. Zamenhof
- * Arta parto
- * Balotoj

הליגה לאספרנטו בישראל
 מתכבדת להזמין
לועידה הארצית
 שתיערך ביום א' 6.4.69 ג' דחיה'ם פסח. בשעה 16
 בבית הועד הפועל של הסתדרות העובדים הכלליים
 (קומה ז'). רח' ארלוזורוב 93 תל-אביב.

סדר היום:

- * פתיחה וברכות
- * דו"ח הועד המרכזי
- * הרצאה: חייו ומוחו של ד"ר אליעזר זמנהוף
- * חלק אמנותי
- * בחירת מוסדות הארגון

ISRAEL  **ישראל**

010 ISRAEL

EXPÉDITEUR **השולח**

ESPERANTO LIGO

EN ISRAELO

Tel-Aviv P. K. 1289

נ. ב.

במקרה ולא תוכלו להשתתף בועידה
 נא להודיענו בריקדם.

הועד

ישראל

Jen vere rara filatela dokumento pri la E-movado en Israelo kun nominalo de 10 cendoj. Temas pri oficiala pk kun privata surpriso.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17,00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15,00



Poŝtkarto

Laborista Antaŭkongreso en Dresden

28-29 Julio 1921

kun Lanti, Rauschenbach

Ili ĉiuj kelkajn tagojn poste fondis dum la UK de Praha SAT.